

Osmo Buller

Pri la malfacila arto de Esperanta libroeldonado

Esperantistoj estis ofte epitetitaj kiel popolo de libro – prave ĉar por la vivo de neniu alia lingvo literaturo tiom esencas kiel por Esperanto. La malgranda popolo de Esperanto vivas tiel disemite tra la mondo, ke la presita vorto pli forte rolas en ĝia vivo ol la parolata. Malgrau tiu graveco la esperantistoj neniam sukcesis aranĝi sian eldonadon en kontentiga maniero.

En la unua jarcento de la lingvo funkciis nur tre malmultaj eldonejoj, kies vivodaŭro kaj nombro de eldonitaj verkoj permesas kompari ilin kun mezgrandaj aŭ eĉ nur malgrandaj eldonejoj de iu malgranda lando, ekz. Finnlando. Inter ili aparte elstaras Literatura Mondo kaj Stafeto, kiuj ambaŭ vivis tiel longe kaj realigis tiel vastan skalon da titoloj, ke per tio ili kreis al si veran profilon kiel eldonejo. En la nuna tempo tia eldonejo estas Hungara



Esperanto-Asocio, kiu laŭ la nombro de titoloj jam superas la du menciitajn, kvankam ĝi ne povis regali la publikon per same mejloŝtonaj verkoj kiel tiuj ĉi. El la aliaj nun agantaj eldonejoj eble nur Artur E. Iltis distingiĝas per propra profilo.

Ĉiuj aliaj, inkluzive de UEA, produktas tro malmulte, por ke estu eble paroli pri konscia eldona politiko aŭ profilo de ili.

Granda plimulto de Esperanto-eldonejoj restis efemeroj de nur unu-du libroj. Eble jam dekomence ili ne celis pli ol aperigon de unu verko ŝatata de la eldoninto mem, eble malbona vendosukceso sufokis la entreprenon antaŭ ol ĝi provis pliajn titolojn. Por esti vivipova eldonejo ja bezonas kapitalon aŭ almenaŭ faciel alireblan klientaron. HEA disponas pri ambaŭ; jen la bazo de ĝia solida vivo kiel eldonejo. Tamen la sukceso de HEA devenas ankaŭ de aliaj faktoroj, kiuj distingas ĝin de ceteraj eldonejoj.

La skalo de la eldonaĵoj de HEA etendiĝas de lerniloj kaj facilaj legaĵoj ĝis valoraj beletraĵoj kaj fakaj verkoj, kio en la Esperanto-mondo signifas: de bone vendataj ĝis malpli rendimentaj. Tia eldona politiko mem subtenas sin: facilaj legaĵoj edukas klientojn por pli postulemaj verkoj. Orminejo tiusence estas István Nemere, kies populareco kaj signifo kiel edukanto de legantaro estas komparebla nur kun tiu de Baghy: plimulto de liaj verkoj ne havas daŭran valoron kiel literaturaĵoj sed ĉiu el ili verkita en maniero alloga al la granda publiko. En la lasta tempo Nemere fariĝis por

HEA eĉ pli riĉa minejo. Per eldonado de liaj hungarlingvaj libroj HEA certigas financadon de multaj Esperanto-verkoj. Sekve HEA, kiu jam komence disponis pri favora bazo por eldonado, efektivigas eldonpolitikon, kiu ne nur retenas sed eĉ plifirmigas ĝiajn eblojn. Tio montriĝas en stabila kresko de jare aperantaj titoloj kaj i.a. en represo de gravaj aŭ multe postulataj verkoj. Represoj tre gravas — kreiĝon de kontinueco en la Esperanta librokulturo tre ĝenis nehavebleco de multaj tradicie gravaj verkoj.

Sian sukceson kiel eldonejo HEA tamen ŝuldas ne nur al favoraj objektivaj kondiĉoj. Same gravas, ke ĝia eldonejo estis gvidata de aparte kompetenta homo, d-ro Vilmos Benczik, kiu krom profesia literaturisto estas ankaŭ pinta konanto de la Esperanto-literaturo kaj – malofta trajto en la movado – lerta komercisto. Estas guste kompetento literatura aŭ komerca aŭ ambaŭ, pri kies manko suferas la eldonistoj.

Amatoreco montrigas en ĉiuj fazoj de la eldona procezo, ekde la elekto de eldonotaj verkoj ĝis ilia surmerkato. Se ni elektas la plej gravan unuopan kampan de Esperanto-libroj, nome la tradukitan beletron, ni facile rimarkas, ke la elekton de ĝiaj titoloj karakterizas arbitro, parohismo, malmoderneco.

Finnoj prezentas bonan ekzemplon. El la finna literaturo aperis libroforme en Esperanto nur Kalevala (en du eldonoj), Sep fratoj kaj tri teatraĵoj de Aleksis Kivi (1834-1872) kaj du romanoj de J. Linnankoski (1869-1913). Ĉiuj ĉi verkoj aperas en la deviga legoprogramo de la finnaj lernejoj. Malica interpreto de tiu ĉi fenomeno, ĝenerala tra nia tuta literaturo, igas nin suspekti, ke esperantistoj entute ne konas sian propran nacian literaturon preter tio, kion ili eksciis pri ĝi en lernejo. Sekve il tradukas nur el inter tiu malvasta kolekto. Nu, almenaŭ la tradukintoj de la menciitaj finnaj verkoj estis kleraj homoj. Tial interpreto prefere estu, ke oni emas aperigi en Esperanto reprezentajn verkojn, kiuj en la nacia literaturo atingis altan statuson, pro kiu ili i.a. farigis lerneja legajo.

Multaj el la libroj, kiuj de jardekoj ŝimas sur libroservaj bretoj, estis tradukitaj supozeble nur pro tio, ke ili estis tre karaj al la tradukinto mem, ĉu pro vera enamiĝo ĉu pro simpla nostalgio. Ofte la tradukinto farigis ankaŭ la eldoninto.

Entute do nia traduka beletro estas tre konservativa parto de nia literaturo. Nur tre malofte oni tradukas el vivanta verkisto – se temas pri finnaj aŭtoroj, tio neniam okazis. Klasikuloj ne aŭtomate meritas aperon en Esperanto. Romano de la sola finna Nobel-premiito (1939) Frans Sillanpää en angla traduko altiris nur 300 aĉetantojn, malgraŭ la reklama puŝo de la premio. En Esperanto eĉ ne valorus provi – krom se iu oficiala instanco subvencius la eldonon. Oni ofte atentigas pri graveco kontroli tradukojn ĉe alilingvanoj antaŭ ol eldoni ilin. Same grave estus peti similan juĝon pri antaŭvidebla interesiĝo ekster la limoj de la propra lando.

Se pri nacinivelaj klasikuloj necesas zorgaj konsideroj pri ilia efektiva valoro internacia, verkoj kaj verkistoj kiuj jam estas rekonitaj kiel parto de la mondliteraturo ne bezonas tian. Ili nepre eniru ankaŭ Esperantan literaturon. Sed...

kiam ekz. anglalingvanoj preskaŭ ĉiujare eldonas ion novan de Sekspiro, la majstreco de tiuj verkoj kaj iliaj tradukoj ne kompensas la doloran mankon de tiaj modernaj aŭtoroj kiel Steinbeck, Hemingway, Greene, Murdoch, Lessing kaj aliaj, kiuj eĉ ne estas aparte avangardaj. Pli forta reprezentiĝo de modernaj aŭtoroj povus influi ankaŭ originalajn verkistojn, almenaŭ tiujn, kiuj pri tiu aŭ jena ondo, stilo, skolo ne jam konscias pere de sia propra lingvo.

Amatora nekono pri la vera bezono kaj aĉetpovo de la Esperanta merkato rezultigas fatalajn eldonkvantojn, kies nevendiĝo detruas aŭ grave lamigas la eldoninton. Unu tia ekzemplo estas la reeldo no de Kalevala en 5000 ekzempleroj. La unua eldono estis farita 20 jarojn pli frue kaj la libro elĉerpigis nur 3-4 jarojn pli frue. Tiel do plejparto de la interesitoj jam posedis ĝin. Multe troigita kvanto rabis rimedojn for de aliaj eldonindaj verkoj.

Plej konkrete la amatoreco manifestiĝas en la fizika vesto de multaj libroj. Literatura Mondo kaj Stafeto tre zorgis pri la tipografio de siaj eldonaĵoj, sed ilia ekzemplo tro malofte estas sekvata nuntempe. Tamen temas pri grava afero ankaŭ por la vendiĝo de la libroj, pro kio neglekti ĝin ekz. nur por ŝpari en eldonkostoj estas miope. Pli bela aranĝo ofte eĉ ne kostus pli, ja la beleco de libro ne postulas lukson.

Taŭga elekto de verko kaj ŝika aranĝo de ĝia fizika vesto en si mem ne garantias vendosukceson, se mankas aktiva surmerkato. Kaj ĝi preskaŭ ĉiam mankas krom en la kazo de ekz. HEA. La eldonistoj preskaŭ regule fidas, ke mencio en la rubriko "Laste aperis" de la revuo "Esperanto" kaj la librokatalogo de UEA plus recenzoj ie tie sufiĉas. Pagi por anoncoj oni eĉ ne konsideras – en "Esperanto" reklamas librojn ape-naŭ aliaj ol UEA mem. Kaj tamen reklamoj preskaŭ aŭtomate alportas aĉetojn, kiel mi mem povis rimarki, kiam laborante ĉe UEA mi faris listojn pri la plej venditaj libroj. Pasiva sinteno al vendado ofte videblas sur la libroj mem: eĉ eldonaĵoj de UEA, kiuj ĝenerale estas aparte zorge kaj bele faritaj, ne ĉiam havas dorskovrilan priskribon pri la verko. Modelaj tiurilate estis la libroj de Stafeto, en kiuj Juan Regulo kreis el siaj libroprezentaj "oreloj" tutan arton.

Preskaŭ ĉiu listo de "Laste aperis" rivelas librojn, kiuj aperis ne laste sed antaŭ pluraj jaroj. Iliaj eldonintoj supozeble tute ne sciis, kion fari por ke ili atingu internacian publikon. Prokrasto de kelkaj jaroj, ĝis la publiko ekscias pri ili, perdigas tiun avantaĝon, kiun ĉiam havas freŝe aperinta libro apud pli malnovaj.

Kompreneble la surmerkato ne estas tasko sole de la eldonejoj sed ankaŭ tiu de la libroservoj. Iliaj problemoj tamen falas ekster la kadro de tiu ĉi eseo, malgraŭ la fakto ke multaj eldonejoj samtempe funkcias kiel libroservoj, ekz. UEA, HEA kaj Flandra Esperanto-Ligo. Tiu ĉi lasta kreis por siaj eldonaĵoj specialan "librorondon", kies anoj ricevas ĉiun novan verkon por rabatita prezo tuj post la apero. Tiun ekzemplon de rekta vendado aliaj eldonejoj ankoraŭ ne rimarkis.

Neprofesieco certe longe restos en Esperanta eldonado. Iujn fiajn aspektojn la publiko eĉ pretas pardoni ĝis la grado, ekz. fuŝan teknikan veston de libro se tamen

kiel verko ĝi estas interesa. Kiel ajn, eraroj ĉe decido pri eldonota verko kaj pri eldonkvanto kaj flegmeco en vendado eĉ de libroj kun potenciala merkato konstante kaŭzas gravan malŝparon de limigitaj resursoj. Veraj viktimoj de tio ĉi estas originalaj Esperanto-verkoj, kiuj povas aperi nur post du jardeka atendado (kiel ekz, La granda kaldrono de John Francis) aŭ eĉ post pli ol 60 jaroj ankoraŭ atendas eldonon, kia fariĝis la sorto de la giganta epopeo Uranogedio de Giordano Ricci, por ne paroli pri ekzemploj malpli imponaj.

Kiel plibonigi la situacion?

Adeptoj de libera konkurenco supozeble diras, ke la merkato mem punas fuŝulojn kaj diletantojn per neaĉeto de iliaj produktoj kaj tio malhelpas ilin plu fuŝi. Tio tamen ne helpas, ke bonaj libroj vendiĝu kaj valoraj manuskriptoj aperu. Nek UEA nek iu ajn alia instanco povas ordoni kaj dikti ion ajn.

Sed mi ne povas imagi alian ol UEA, kiu povus ion entrepreni. Ĝi devus kunvoki la eldonejojn, organizi ilin en ia formo, kosili ilin, admoni, helpi. Tiaj kunordigaj provoj antaŭ kelkaj jaroj jam okazis laŭ iniciato de UEA, sed ili forvelkis pro manko de interesiĝo de aliaj eldonejoj. Sed – oni provu denove. Same kiel neesperantistaj eldonejoj havas siajn landajn kaj internaciajn organizaĵojn, ankaŭ la esperantistaj tian bezonas.

Krome, UEA bezonas specialan komisionon pri problemoj de eldonado aŭ minimume tiu problemaro devus aparteni al la respondeco de iu el ĝiaj estraranoj. Tiu estrarano i.a. en la ĉiujara raporto de la Estraro prijuĝu la kvalitan kaj komercan aspektojn de la eldonado dum la pasinta jaro. Nepre bezonata estas ankaŭ Esperanta "Nobel-premio" – nur sub UEA ĝi povus fariĝi vere prestiĝa. Kaj kial ne premii ankaŭ ekz. la plej belan libron de la jaro, same kiel oni jam premias la plej bonan infanlibron de la jaro.

Ĉio ĉi povus esti paŝoj, kiuj helpu, ke la esperantistoj fariĝu popolo de eĉ pli bonaj libroj.

1988.11.18.